# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 21. — REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. — Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

*El Informletero n-o 6 de Centra Konsilantaro de Militantaj Ateistoj en USSR, Moskvo, Sretenka 10.*

## TUTSOVETIA VIRINA KONTRAŬRELIGIA KONFERENCO

En fino de decembro okazis la unua tutsovetia konferenco de kontraŭreligiulinoj k kult-armeaninoj (aktivulinoj de kultura fronto). Ĉi tiu konferenco estis la unua interŝanĝo de sperto inter kontraŭreligiulinoj k kultarmeaninoj de tuta USSR. Ĝin ĉeestis 160 personoj, plejparte laboristinoj k kolĥoz-aninoj. La konferenco akceptis kelkajn decidojn k montris praktikajn vojojn al fortigo de kontraŭreligia laboro inter virinoj. En ĉi tiu agado oni devas konsideri k atenti la kompare pli malgrandan socipolitikan k teknikan kleron de l' tuta amaso da virina loĝantaro, ligitecon de la virino per familiaj kondiĉoj, ŝian pli grandan, dependan de ĉi tiuj k kelkaj aliaj kaŭzoj konservativemon en religiaj demandoj.

La konferenco esprimis neceson krei specialan virinan kontraŭreligian filmon k montris neceson utiligi sovetfakojn de registrado de civitanstataj aktoj (edziĝo, naskiĝo ktp.), societo por protektado al patrinoj k suĉinfanoj k de "punktoj" de analfabetlikvidado por kontraŭreligia laboro.

En tuta tiu laboro precipe devas esti priatentataj demandoj pri rekonstruo de l' vivmaniero: aktivulinoj-ateistinoj devas esti iniciatantoj k organizantoj de infan-institucioj, tolaĵlavejoj, komunmanĝejoj k instaloj helpantaj al plibonigo de kulturaj kondiĉoj de l' laborula virino.

La kontraŭreligia laboro en lernejo devas esti firme ligita kun laboro inter gepatroj, ankaŭ devas esti aktivigita la kontraŭreligia laboro en bibliotekoj.

Al C. K. de U.M.A. (Militantaj Ateistoj) oni proponis organizi regulan aperigon de "ateistina folio" en gazeto "Bezbojnik" Oni devas priatenti utilon de aliaj periodaj ateistaj eldonajoj k de specialaj virinaj revuoj por la klarigo de problemoj pri kontraŭreligia laboro inter virinoj.

Organoj de U.M.A. devas esti fortigitaj de virinoj-aktivulinoj, rekomenditaj por gvidlaboro en U.M.A. Plej grave devas esti atentata la el-kreskigo de virina aktivularo.

---

### Kontraŭreligiaj muzeoj en USSR

Centra kontraŭreligia Muzeo en Moskvo vaste disvolvis sian laboron. Dum unu jaro (de 1. novembro 1929 ĝis 1. novembro 1930) la muzeo akceptis 234 716 vizitantojn (el ili 3 330 ekskursaj grupoj kun 130 059 partoprenintoj k 104 657 izoluloj).

Granda kontraŭreligia muzeo en USSR estas ĵus malfermita de Leningrada landparta konsilantaro de UMA en estinta katedralo je nomo de Isaako.

Vastan kontraŭreligian laboron efektivigas la tutukrainia muzea urbeto: estinta Kieva "Lavro" (unuaranga

---

restarigo. Konsiderante la malviglan edukaktivecon ĉe la amasoj, tiu rimedo pendigas gravajn konsekvencojn super la tuta kolĥoz-ekzistado.

La tribunaloj el K-doj, organizitaj ĉe la kolĥozoj, estas neaktivaj k ĝuas nenian konfidon. La tribunalprezidanto havas, ĝenerale, tro multe da laboro en la ekonomia fako; li ne havas tempon ekzameni la diversajn kazojn. Tiu socia aktiveco estas por li devigo, kiun li celas kiom plej eble eviti. Tio maltrankviligas la homojn de la kolĥozoj: ili postulas insiste reorganizadon de tiu grava socia funkcio. Unue, la tribunalprezidanto devus esti liberigata de ĉiu okupo en la ekonomio k ricevi salajron; efektive, la procesoj estas multnombraj: gravaj ofendoj al la disciplino, intenca fuŝado, kanajlagado, ktp. La malriĉaj kamparanoj k la kamparanaj taglaboristoj formas la plej malprogreseman parton el la amaso de l' kolĥozloĝantoj. Estas la mezaj kamparanoj, kiuj konsistigas la plej kapablan k plej disciplinan grupon por la laboro. Sed tiuj malŝanĝiĝemaj elementoj konsideras la malriĉajn kamparanojn k la taglaboristojn kiel parazitaĉojn. Tiu antagonismo ne estas forigata, tiom pli ke la simpatio de la agemaj batalantoj prefere iras al la mezaj kamparanoj. Malgraŭ ke oni senĉese ripetadas la vortojn "malriĉaj kamparanoj" k "kamparanaj taglaboristoj", reale tiuj ĉi vivas izolaj. Mi diras denove: inter la amasoj ne estas efektiva aktiveco. Tio estas la fundamenta malvirto. Jen tiel oni juĝas, entute, la du kontraŭajn partojn: la meza kamparano bone laboras, la malriĉa kamparano k la taglaboristo malbone laboras.

Grandaj difektoj estas kaŭzataj de la indiferenta k nur formala sinteno pri la intenca fuŝado, kiun adoptas la agemaj batalantoj, same kiel la sovetiaj institucioj de kriminala enketo. Ekzemple, bruligantoj promenas libere; la brulegoj estas konsiderataj kiel sensignifaj epizodoj. Bruligantoj en la stanico (vilaĝo) Novomalorosijsk, senditaj al la regiona direkcio, estis liberigataj de ĉi tiu. Ili promenas arogante sur la stratoj k rikanas. En la stanico Novograjdansk, la kulakoj k iliaj policanoj regas per teruro la kolĥozloĝantojn. La malliberuloj estas liberigataj k plue agas per pli intensa energio. Oni povus citi multe da similaj ekzemploj. La konferencoj pri produktado laboras tiel malbone. Ili apartiĝis de la amasoj: kutime la agemaj batalantoj k la delegitoj nur kunvenas. La amaso ne scias, kiaj estas la aferoj, kiujn ili ekzamenas.

La kooperaj societoj estas la ŝtono por ekpuŝi la debaton. Ili estas la sola konversaci-temo. Kiaj ajn estas la demandoj, kiuj subite ŝprucas, la diskuto neeviteble estas revenigata al la aktiveco de la kooperaj socioj. La provizumo al la kamparo ne plu progresas. Estas la "plej malforta" punkto en la kolĥozmovado. Neniom da ŝtofoj, petrolo, sapo, piedvestoj: manko, ĝenerale, de ĉiuj produktoj, kiujn la kamparanoj plej multe bezonas. La komercajoj alvenas puŝo-postpuŝo, laŭ neorganizita maniero, po unu plenkulero monate. Estas vere, ke ĉiuj konas la malfacilaĵojn; sed neniu volas atendi. Kutime oni aplikas jenan agmanieron: se kamparanoj liveras la grenon abunde k antaŭ la templimo, ili ricevas antaŭ la fikstempo mezbonan provizumon. Kiuj transdonas la kontrakte fiksatajn kvantojn da viando, tiuj ricevas, pluse al la mona ekvivalento, du rublojn da industriaj produktoj.

Necesas fundamente reorganizi la labormetodon en la kolĥozoj. Necesas ĉiujn fortojn mobilizi por ĉiujn ĉi danĝerojn k ĉiujn ĉi malfortajn punktojn forigi. Necesas zorgi pri tiuj traboroj, ilin juĝi laŭ ilia ekzakta valoro, por poste pli rapide progresi. Se ne okazas decidaj ŝanĝoj en tiu punkto, ne ebla estos fruktodona laboro por plifirmigi la movadon pri kolektivigo, por en la kolĥozoj kuntreni la malplimulton, kiu ankoraŭ kontentiĝas per la privata ekonomio. Tiuj kamparanoj malmultvorte respondas, kiam oni al ili demandas, kial ili ne aliĝas al la kolektivaj bienoj:

— Ho! ni, ni atendos; ni konstatos tion, kio rezultos, kiel tio funkcios. Ne estas kaŭzo por rapidiĝi. (Finota.)

*Trad. la Alĝera Esperantista Grupo.*